
GAZETARA KOMUNIKO

* Invito

La Esperanto-Grupo Verviersa, Senlime, la regiona kultur-centro Verviersa, la Verviersa urbo, la Franclingva komunumo en Belgio kaj Jean-François Istasse invitas vin al SPECIALA TRILANDA RENKONTIĜO en VERVIERS (Belgio), dimanĉon la 14an de oktobro 2007.

Programo :

09h30 Malfermo de la akceptejo (Hotel des Ardennes, Verviers, flanke de la stacidomo).

10h30 Promenado de fontano al fontano, inkluzive de la ZEO de la Verda Placo, ĝis?

11h00 Oficiala akcepto en la urbo-domo

12h00 Promenado al la manĝejo

15h00 Projekciado de la filmo « Incubus » en la « spaco DUESBERG » (264 sidlokoj en moderna salonego)

17h00 Manĝeto en Hotel des Ardennes kaj disiĝo.

* Pri la historio de Esperanto-Grupo Verviersa

La Esperantista Grupo de Verviers estas fondita en 1906 (statuto datiĝus de 1908) kaj havis sidejon ĉe Harold E. PALMER, placo Verda 20.

Kiel instruisto, tiu unua « ĝenerala sekretario » de la « Societo Esperantista de Verviers » estis aŭtoro de lernmetodo de Esperanto aperinta ĉe eldonisto famkonata de la belgaj esperantistoj: A. J. WITTERYCK-DELPLACE (Bruĝo). Unua reklamo aperis en « Lingvo Internacia ».

La franclingva gazeto « Temps Jadis » [lama epoko] konfirmas la ĉeeston de esperantistoj en Verviers en 1906. Je la 30a de junio 1907, le komitato de la grupo konsistis el E. MATHIEU, strato de la Montagne 45 (instruisto), Harold E. PALMER (sekretario), kaj G. LANGE, el Ensival.

Membroj : Sinjorinoj Jeanne XHOFFER kaj Jeanne FLORENCE, Sinjoroj DELBASCOUR kaj Joseph PIRNAY. En aŭgusto-septembro 1908, la grupo partoprenos «Ekspozicion pri Artoj kaj Métioj» organizitan de la Verviersa urbo : ĝi prezentos diversajn tekstojn, dokumentojn, fotojn kaj varojn stampitajn de esperantista signo. La sekretario de la ekspozicio estas strato Xhavée 9, ĉe Joseph PIRNAY...

Esperanto tiam ekzistis nur de 19 jaroj. En la komenco, esperanto nur perkoresponde disvastiĝis. De 1898 ĝis 1900, multnombraj kursoj publikaj malfermiĝis kun granda sukceso en urboj de sud-Francio, Belgio, Ruslando kaj eĉ Brazilo. La unua kurso de esperanto en Belgio verŝajne komenciĝis en Bruselo en januaro 1898. La tieaj lernintoj tre rapide ekinstruis esperanton, unue en Gilly, en marto 1898; poste en Spa, en aprilo de la sama jaro. La instruanto estis iu Ch. HAULT, kiel atestas artikoloj de RANE GYRENE en « Le Soir » [La Vespero] kaj de DE BEAUFRONT, en « L'Espérantiste ». Eble jam troviĝas la unuaj verviersaj esperantistoj inter la lernintoj de tiuj kursoj...

Dum la 7a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Antverpeno en aŭgusto 1911, kiu arigis 1800 partoprenantojn inter kiuj 137 Belgoj, oni trovas, unuafoje, 3 Verviersanojn:

Julien HERLA, bibliotekisto en la Justic-Palaco ; Joseph PAROTTE, komercisto, kaj S-ino PAROTTE.

Notinda estas grava detalo : inter la membroj de la Honora-Komitato de tiu Universala Kongreso estis iu Jules SPINHAYER, skabeno pri la Publikaj Laboroj en la Verviersa Urbo, kiu poste iĝos urbestro. Oni do vidas ke jam en tiu epoko la komunumaj responsuloj interesiĝis pri Esperanto.